(例如, Li farigis veston per virino. 他叫一位妇女给他做衣服。)

legi (*tr.*) 读

legigi 使...读

(例如, Li legigis la leteron al ŝi. 他叫人给她读了那封信。)

(2) -iĝ-

(a) 加在名词词根上

tago 白天

aro 群

tagiĝi 黎明

ariĝi 成群

tero 土

ŝtono 石头

nenio 无物

(b) 加在形容词词根上

ruĝa 红

saĝa 聪明

nova 新的

lerta 巧

dolĉa 甜

(c) 加在动词词根上

stari (*ntr.*) 站

koleri (*ntr.*) 生气

sidi (*ntr.*) 坐

aŭdi (*tr.*) 听

vidi (*tr.*) 看见

teriĝi 变成土

ŝtoniĝi 变成石头

neniĝi 化为乌有

ruĝiĝi 变红, 羞红

saĝiĝi 变聪明

noviĝi 变新

lertiĝi 变灵巧

dolĉiĝi 变甜

stariĝi 站起来

koleriĝi 发火

sidiĝi 坐下

aŭdiĝi 被听见, 响

vidiĝi 被看见, 显现

特别值得注意的是 *-ig-*, *-iĝ-* 加在及物动词上构成的使动和被动意味的动词。例如:

1. Aŭdiĝis bruo en la korto. 院子里响起喧闹的声音。
2. Tie vidiĝis floroj. 在那儿看得见花。
3. La letero skribiĝis per li. 信由他写好。
4. Ili baniĝis en pluvo. 他们淋在雨里。
5. Ĉio fariĝis per ilia laboro. 一切由他们的劳动做成。

EKZERCOJ 练习

A. 将下列词译为汉语:

- | | | |
|----------------|----------------|---------------|
| 1. aerplena | 2. senaera | 3. ĉapeleto |
| 4. forgesema | 5. forgesemulo | 6. sensuna |
| 7. sennuba | 8. ŝipeto | 9. ŝipisto |
| 10. ekstari | 11. dupieda | 12. kvarpieda |
| 13. tablopiedo | 14. bovino | 15. fajrego |

- | | | |
|-------------------|---------------|-----------------|
| 16. ploregi | 17. plorema | 18. kamparo |
| 19. kamparano | 20. kolerigi | 21. mortinto |
| 22. vastega | 23. malvenki | 24. malvenkinto |
| 25. malvasta | 26. popolano | 27. aermanka |
| 28. bovisto | 29. ĉefurbo | 30. kolerema |
| 31. mortlito | 32. danĝerulo | 33. kampulo |
| 34. suferulo | 35. banujo | 36. nubeto |
| 37. nubego | 38. piedeto | 39. ŝipego |
| 40. forgesemulino | | |

B. 将下列句子译成世界语:

1. 数不清的鸟那时正在海上飞翔。
2. 向我们走来的二男三女都是年轻人。
3. 牧羊人和放牛娃做了朋友。
4. 休息了的工人又回到车间去了。
5. 游览这座城市之前我觉得它美, 游览之后, 觉得它真是美极了。
6. 游客一群一群上了山, 去看瀑布。
7. 瀑布从山顶落下来发出巨大响声。
8. 正在写信的叔叔回答了他的问题。
9. 胜利者不应该骄傲, 失败者应该不要失望。
10. 骄者一定会失败。

C. 改正下列句子中的错误:

1. *Ŝi veninte, mi foriris.*
2. *Vesperiginte mi revenis hejmen.*
3. *Mi estas tri paŝoj de li.*
4. *La domo staras en du arboj.*
5. *Nia ŝipo veturis preter lia hejmon.*
6. *La birdo flugis el la arbaron.*
7. *Mi donis al ŝin pecon da pano.*
8. *Ŝi erarinte, mi ĝustigis ŝin.*

Ĉ. 用下列分词各造一句:

1. loĝante
2. koninte
3. vidinta
4. ripozanta
5. pro-

menantoj 6. ironta 7. kunlaborinto 8. parolanto 9. plorinte
10. ridante

D. 将下面的故事译为汉语:

Forgesemulo

Viro havanta malbonan memoron ricevis la kromnomon Forgesemulo. Estante knabo, li foje kaj refoje forgesis kunporti lernolibron kaj krajonon. Estante junulo li foje kaj refoje forgesis la daton de rendevuo kun amikino. Nun estante 40-jara li havas ankoraŭ pli malbonan memoron.

“Mi iros al la bazaro,” diris Forgesemulo al la edzino matenmanĝinte.

“Por kio?” demandis la edzino.

“Mia ĉapelo tro malnoviĝis, mi volas novan. Sed mi timas, ke mi forgesos tion alvenante al la ĉiovenda bazaro. Kion vi konsilas fari?”

La edzino iom pripensis kaj diris: “En ĉapelo kaj aĉeti estas Ĉ, kaj Ĉ havas ĉapelon sur si. Memoru la similecon de ĉapelo kaj aĉeti kaj vi ne forgesos!”

Elirinte el la hejmo li pensis: “De la hejmo ĝis la bazaro estas longa distanco. Kiel bone estus, se mi havus ĉevalon. Mi ja havas sufiĉe multe da mono por aĉeti ĉevalon.” Tion pensante, li paŝis sur ŝtonon kaj falis. Restariĝinte li sentis pli grandan deziron aĉeti ĉevalon al si, ĉar ankaŭ en “ĉevalo” estas “Ĉ”!

Alveninte al la bazaro, li tuj vidis blankan ĉevalon fortan kaj belan. Li aĉetis ĝin kaj veturis sur ĝi al la hejmo. Li ligis la ĉevalon al pino ekster la pordo kaj ĝoje iris al la edzino.

“Kial vi revenas portante la malnovan ĉapelon surkape?” mire demandis la edzino. “Ĉu vi forgesis aĉeti novan ĉapelon por vi?!”

“Ho, vere! Mi forgesis!” diris Forgesemulo.

“Memoru, ke en ambaŭ ĉapelo kaj aĉeti estas Ĉ, kaj Ĉ havas ĉapelon sur si!”

“Jes, mi memoros tion!” Dirinte “ĝis revido” Forgesemulo eliris el la hejmo. Li ekvidis la ĉevalon kaj pensis:

“Kies ĉevalo ĝi estas? Eble iu forgesis ĝin. Nu mi veturu per ĝi al la bazaro!”

“Ĉapelo, aĉeto, ĉapelo, aĉeto, Ĉ, Ĉ, Ĉ...” li diradis survoje.

La ĉevalo kuris rapide kaj Forgesemulo sentis grandan plezuron sur ĝi. Refoje alveninte al la bazaro, li jam ne memoris kion li devas aĉeti. Li memoris nur Ĉ, sed kio estas la aĉetaĵo?! Li metis sian manon en la poŝon. La mono en la poŝo malaperis! Maltrankvile li ekrigardis la ĉevalon, li ekmemoris, ke li aĉetis la ĉevalon per sia mono! Ja ankaŭ en “ĉevalo” estas Ĉ, kiu havas sur si “ĉapelon”!

Ventego eklaboris forte. Ĝi forportis la malnovan ĉapelon de sinjoro Forgesemulo. Li kuregis por atingi ĝin kaj ellasis la ĉevalon. Ankaŭ la ĉevalo ekkuris — al alia loko kaj baldaŭ malaperis. La ĉapelo flugis sur altan arbon kaj Forgesemulo ne havis forton por grimpi sur ĝin. Fine, perdinte la ĉevalon kaj ĉapelon, li devis reveni al la edzino. Aŭskultinte la rakonton de la edzo ĉion perdinta, ŝi diris trankvile: “Ne gravas. Baldaŭ vi ja forgesos ĉion!”

E. 找出上面故事中的分词副词并说明它们的作用。



DUDEKA LECIONO 第二十课

BAZAJ FRAZTIPOJ 基本句型

1. Naĝonte ni devas iom ripozi.
2. Kuŝi sub la ĉielo en tia vetero estas tre agrable.
3. Mi tre ĝojas konatiĝi kun vi ĉi tie.
4. Ĉu vi povus sciigi al ni, de kie vi venis?
5. Ŝajnas al mi, ke vi estas arkitekto, ĉu ne?
6. Mi deziras, ke via deziro estu plenumita.

NOVAJ VORTOJ 生 词

naĝi [ntr.] 游泳	estro 负责人, 领导, 头目, 首长
ŝerci [ntr.] 开玩笑	moki [tr.] 嘲笑
kuŝi [ntr.] 躺, 卧	regi [tr.] 统治, 控制
turisto 旅游者	tuŝi [tr.] 摸, 触动
akompani [tr.] 陪伴	puŝi [tr.] 推
Pekino = Beijing 北京	kapti [tr.] 捕, 捉
turismo 旅游	krei [tr.] 创造
arkitekturo 建筑艺术, 建筑学	rimarki [tr.] 注意到, 发现
arkitekto 建筑家	ŝanĝi [tr.] 变, 改变
originala 原作的, 独创的	veki [tr.] 唤醒
plen-um-i [tr.] 完成	aranĝi [tr.] 安排
plago 沙滩	tiri [tr.] 拉, 牵
spirito 精神, 精灵	vilaĝo 村庄
rafano 萝卜	kolekti [tr.] 搜集, 采集
bruli [ntr.] 燃烧	timi [tr.] 怕
direkti [tr.] 指方向	krii [ntr.] 喊

TEKSTO 课 文

Vizitado tra la Urbo (2) 城市游览(二)

Jiang Hai: Instruistino, ni naĝu en la maro, promeninte.

Ĉu vi konsentas?

Li Cheng: Mi konsentas.

Jiang Hai: Kaj vi, Yang Fan?

Yang Fan: Mi konsentas.

Jiang Hai: Kaj vi, Wen Qing?

Wen Qing: Ankaŭ mi.

Jiang Hai: Ĉu vi ambaŭ konsentas?

Wen Qing kaj Jang Fan: Jes.

Jiang Hai: Do naĝonte, mi devas iom ripozi.

Li Cheng: Kial, Jiang Hai?

Jiang Hai: Ili ambaŭ...

Li Cheng: Ho, mi komprenas...

Wen Qing: Jiang Hai, vi estas ŝercemulo!

Jiang Hai: Ha, estas agrable!

Li Cheng: Jes, kuŝi sub la ĉielo en tia vetero estas tre agrable.

Jiang Hai: Hodiaŭ estas multaj naĝantoj.

Li Cheng: Rigardu, sur la plaĝo la naĝintoj sin banas en la suno.

Wen Qing: Jes. Foje ankaŭ naĝontoj faras la samon.

Li Cheng: Estas tre agrable fari sunbanon post naĝado.

Yang Fan (donas trinkaĵon): Bonvolu, instruistino. Ĉu vi

volas ankoraŭfoje naĝi?

Li Cheng: Naĝonte, mi devas iom ripozi.

Yang Fan (donante trinkaĵon): Bonvolu, Jiang Hai kaj Wen Qing.

Jiang Hai (stariĝas): Mi estos refoje naĝanta.

Yang Fan: Ankaŭ mi estos refoje naĝanta.

Jiang Hai: Iru.

Li Cheng (vidas ion sur la plaĝo): Weng Qing, kio estas tio?

Wen Qing: Tio estas konko. Metiartaĵoj el konkaĵoj kaj markreskaĵoj estas bonaj memoraĵoj por turistoj.

Li Cheng: Kie oni povas ilin aĉeti?

Wen Qing: Naĝinte, mi akompanos vin aĉeti.

(Ĉe vendisto de konkaj metiartaĵoj.)

Wen Qing: Kiun el ili vi volas aĉeti?

Li Cheng: Tiun metiartaĵon el konkaĵoj.

Jiang Hai: Instruistino, jen esperantisto.

Li Cheng: Ho jes! Saluton, samideano!

Arkitekto: Saluton!

Li Cheng: Mi tre ĝojas konatiĝi kun vi ĉi tie!

Arkitekto: Ankaŭ mi.

Wen Qing: Ĉu vi povus sciigi al ni, de kie vi venis?

Arkitekto: Mi venis el Pekino.

Wen Qing: Dankon.

Yang Fan: Ĉu vi venis ĉi tien por turismo?

Arkitekto: Jes, mi venis por rigardi la arkitekturon de la urbo.

Jiang Hai: Ŝajnas al mi, ke vi estas arkitekto, ĉu ne?

Arkitekto: Jes, mi estas arkitekto.

Li Cheng: La arkitekturo ĉi tie estas tre originala, ĉu ne?

Arkitekto: Jes, vi pravas.

Li Cheng: Do mi deziras, ke estu plenumita via deziro.

Arkitekto: Koran dankon! Mi devas foriri. - Ĝis revido!

Ĉiuj aliaj: Ĝis revido!

Wen Qing: Instruistino, morgaŭ ankaŭ ni rigardu la arkitekturon de la urbo.

Li Cheng: Bone. Sed, kiu estu gvidisto?

Jiang Hai: Verŝajne, morgaŭ mi fariĝos gvidisto.

Yang Fan: Jiang Hai, mi kredas, ke morgaŭ vi ĝojigos la instruistinon.

Li Cheng: Koran dankon!

KLARIGOJ 注 释

1. ŝercemulo 爱开玩笑的人
2. bani en la suno 日光浴 (这里 suno 有日光的意思)
3. de kie vi venis 你从哪儿来?
4. Pekino (北京) 是世界语化了的名字。世界著名城市上海 (Ŝanhajo), 纽约 (Novjorko), 巴黎 (Parizo), 伦敦 (Londono), 东京 (Tokio), 华盛顿 (Vaŝingtono), 莫斯科 (Moskvo), 日内瓦 (Ĝenevo), 罗马 (Romo) 都有世界语化了的名称。在通信时, 为便于邮局辨认, 仍可用民族语的通用写法。
5. originala 表示“有独创性的, 不同一般的”。originalo 原作。
6. prava 与 ĝusta 都可以译为“对的”, 但意思不一样。prava 是说符合实际, 有道理, ĝusta 是说正好, 合乎规范、恰当、准确。
7. fariĝi 做, (充)当, 也可以用 iĝi 来表示这个意思。

GRAMATIKO 语 法

A. 分词 (2)

现在我们来讲分词另一大类: 被动分词。

(1) 被动分词的种类

被动分词形容词 由及物动词词根 + 被动分词后缀 + 形容词词尾构成。

(a) 现在被动分词形容词 (~ata), 例如:

frapi 拍打	frapata 正被拍打的
ami 爱	amata 正被爱的
preni 拿	prenata 正被拿的
skribi 写	skribata 正被写的
rigardi 看	rigardata 正被看的
legi 读	legata 正被读的
koni 认识	konata 现在被认识的
atendi 等待	atendata 被等待着的
akcepti 接受	akceptata 正被接受的
havi 有	havata 现在具有的
kudri 缝	kudrata 正被缝制的
senti 感觉	sentata 正被感觉的

(b) 过去被动分词形容词 (~ita), 例如:

montri 指示, 显示	montrita 已指出的
trinki 喝	trinkita 已喝的
renkonti 遇	renkontita 已遇到的
ricevi 收到	ricevita 已收到的
scii 知道	sciita 已知的
ŝalti 开电门	ŝaltita 已开了电门的
viziti 访问	vizitita 已访问过的
doni 给	donita 已给的
inviti 邀请	invitita 已邀请的
verki 创作	verkita 已创作好的

(c) 将来被动分词形容词 (~ota), 例如:

danki 感谢	dankota 将被感谢的
bani 沐浴	banota 将沐浴的
dividi 分配	dividota 将被分配的
esprimi 表示	esprimota 将被表示的

festi 庆祝
gratuli 祝贺
helpi 帮助
komenci 开始
lerni 学习
manĝi 吃

festota 将被庆祝的
gratulota 将被祝贺的
helpota 将被帮助的
komencota 将被开始的
lernota 将被学习的
manĝota 将被吃的

被动分词副词 由及物动词词根 + 被动分词后缀 + 副词词尾构成。

(a) 现在被动分词副词 (~ate), 例如:

tiri 拉
bruligi 使燃, 点燃
celi 瞄准
ĉirkaŭi 围
direkti 指引, 指挥
estri 领导, 管辖
regi 统治
moki 嘲笑
tuŝi 触, 摸
puŝi 推

tirate 被拉着
bruligate 被点燃时
celate 被瞄准时
ĉirkaŭate 被围着
direktate 被指挥着
estrate 被领导着
regate 被统治着
mokate 受着嘲笑
tuŝate 被触摸着
puŝate 被推着

(b) 过去被动分词副词 (~ite), 例如:

kapti 捉
krei 创造
rimarki 注意到, 发觉
ŝanĝi 变, 改变
veki 唤醒
aranĝi 安排
forlasi 放弃
helpi 帮助
foti 照相
komenci 开始

kaptite 被捉住后
kreite 造出后
rimarkite 被发觉后
ŝanĝite 改变后
vekite 被唤醒后
aranĝite 安排后
forlasite 被放弃后
helpite 被帮助后
fotite 被照过相后
komencite 开始以后

(c) 将来被动分词副词 (~ote), 例如:

aĉeti 买

aĉetote 将要被买时

vendi 卖
kalkuli 数
akcepti 接待
kapti 捉
renkonti 遇
moki 嘲笑
puŝi 推

vendote 将要被卖时
kalkulote 将要被数时
akceptote 将被接待时
kaptote 将被捉住时
renkontote 将被遇见时
mokote 将被嘲笑时
puŝote 将被推时

被动分词名词 由及物动词词根 + 被动分词后缀 + 名词词尾构成。

(a) 现在被动分词名词 (~ato), 例如:

ami 爱
regi 统治
puŝi 推
moki 嘲笑
helpi 帮助
gvidi 领导
atendi 等候
bezoni 需要
danki 感谢
elekti 选

amato 爱人
regato 被统治者
puŝato 被推者
mokato 受嘲笑者
helpato 受帮助者
gvidato 被领导者
atendato 被等候者
bezonato 被需要的人
dankato 被感谢者
elektato 被选举者

(b) 过去被动分词名词 (~ito), 例如:

forgesi 忘记
helpi 帮助
instrui 教
interesi 使感兴趣
kapti 捉
sendi 差遣
kuraci 治疗
logi 吸引
mirigi 使惊异
moki 嘲笑

forgesito 已被忘记者
helpito 被帮助过的人
instruito 受过教育者
interesito 感兴趣者
kaptito 被捉获者
sendito 使者
kuracito 被治疗过的人
logito 被吸引了的人
mirigito 被惊呆的人
mokito 受嘲笑的人

(c) 将来被动分词名词 (~oto), 例如:

venki 战胜
 liberigi 解放, 使自由
 naski 生
 gratuli 祝贺
 veki 唤醒
 pardoni 原谅
 prezenti 介绍
 respondi 回答
 sekvi 跟随
 vendi 卖

venkoto 将被战胜者
 liberigoto 将获释者
 naskoto 将被生下的人
 gratuloto 将被祝贺者
 vekoto 将被唤醒者
 pardonoto 将被原谅者
 prezentoto 将被介绍者
 respondoto 将被答复者
 sekvoto 将被追随者
 vendoto 将被卖掉的人

(2) 被动分词的用法

被动分词形容词词的用法

(a) 与 *esti* 连用构成动词复杂时的被动语态:

1. Ĝi estis	{	farita.	它过去已被做了。(过去完成时)
		farata.	它过去正被做着。(过去进行时)
		farota.	它过去将被做。(过去将来时)
2. Ĝi estas	{	farita.	它现在已被做了。(现在完成时)
		farata.	它现在正被做着。(现在进行时)
		farota.	它现在将被做。(现在将来时)
3. Ĝi estos	{	farita.	它将已经被做了。(将来完成时)
		farata.	它将正在被做着。(将来进行时)
		farota.	它那时将被做。(将来将来时)

在这些句子里被动分词也可以当表语看待。要表示动作的执行者, 可以用介词 *de* 引入, 放在被动分词后面, 例如:

1. La veturilo estas tirata de ĉevalo. 那辆车由一匹马拉着。
2. La konko estas rimarkita de ŝi. 贝壳被她注意到了。
3. Hieraŭ je la oka la birdo estis ŝanĝita de li kontraŭ ludilo. 昨天8点他把那只鸟换了一件玩具。
4. La lernejestro estis amata de la lernantoj. 那位校长为学生所喜欢。
5. Ni estos senditaj de li al la kamparo. 我们将被他派往乡下。

6. Dankunveno estos aranĝita de ni en la poŝtoŝeĵo. 舞会将由我们在邮局里组织安排。

7. La Esperanto-rondo estas direktata de kuracisto. 那个世界语团体由一位医生领导。

8. Kiam li revenis, la pordo estis tuj malfermita de la pordisto. 当他回来时, 门马上就要给看门的开开了。

9. Morgaŭ vespere, vi estos invitata al danco. 明晚你将被邀去跳舞。

10. Se vi tiel laboregas, baldaŭ vi estos lacigita. 你这样猛干, 不久就会累着。

11. Ĝi estas legota de mi, sed vi povas ĝin legi nun. 它是我要读的, 不过你可以现在读。

12. La grupestro estas akceptota de ili. 那位组长将被他们接受。

(b) 在句中做定语, 例如,

1. Sur la muro estas bildo pentrita de li. 在墙上有一张他画的画。

2. La geknaboj instruataj de li lernas tre diligente. 他教的学生很勤学。

3. Mi ricevis leteron skribitan de lia frato antaŭ semajno. 我收到了他兄弟一周前写的信。

4. Li estas mallaborema homo mokata de la kunuloj. 他是个被伙伴们嘲笑的懒汉。

5. Ne tro frue ĝoju pro helpo ricevota. 不要因为将会得到的帮助高兴得太早。

6. Afero farota ne estas afero farita. 将要做的事不是已经做了的事。

(c) 与 la 连用充当名词, 例如,

1. La helpitaj dankis la helpantojn. 受帮助的帮助者感谢了帮助者们。

2. La regataj maltrankviliĝis. 被统治者不安起来。

被动分词副词的用法

被动分词副词在句子里做状语, 说明它修饰的动词所表示的动作或状态发生在以前、同时或者以后。它和所修饰的动词要用同一主语。

(a) ~ite 表示在以后, 如:

1. **Vokite, li tuj eliris.** 被呼唤后他立刻出去了。
2. **Demandite de la onklo, li diris ĉion.** 他被叔父问过后, 把一切都说了。
3. **Kaptite la rato ankoraŭ deziris forkuri.** 被捉住后, 老鼠还想跑哩。

4. **Ili eniris tute ne rimarkite.** 他们进去了, 完全没有被发觉。

5. **La infano falis, puŝite de la knabo.** 那孩子给男孩推倒了。

(b) ~ate 表示在同时, 如:

1. **Li lernas helpate de sia onklo.** 他在叔父帮助下学习。

2. **Mokate li ludadis la muzikilon.** 他在嘲笑下弹奏乐器。

3. **La ĉevalo paŝis malrapide, tirate de la sinjoro.** 那匹马给那位先生牵着慢慢踏着步子。

4. **Tuŝate la hundo kuŝiĝis.** 被摸着的时候, 狗卧下了。

(c) ~ote 表示在以后, 例如:

1. **Forlasote la infano ekploris.** 小孩将被遗弃的时候哭了。

2. **Finlegote la libro malaperis.** 将要读完的时候书不见了。

3. **Sendote de ŝi la letero venis en liajn manojn.** 信将要被她寄出时, 落到了他的手里。

被动分词名词的用法 (与普通名词一样)

(a) 做句子的主语, 例如:

1. **La amato de ŝi baldaŭ fariĝos kuracisto.** 她的爱人不久将成为医生。

2. **La helpato ĉiam bone plenumas sian laboron.** 那位被助者总是好好完成他的工作。

(b) 做句子的表语, 例如:

1. **Mia amiko estas helpato de tiu ĉi vilaĝo.** 我的朋友是这个村子的帮助对象。

2. **Ili estas bezonatoj por paco.** 他们是和平所需要的人。

3. **Li estas sendito de la urbestro.** 他是市长的使者。

(c) 做句子宾语, 例如:

1. **Neniu helpos la favoraton de la ĉefo.** 谁也不会帮助头目宠爱的人。

2. Ni fermis la kaptitojn en ĉambbron. 我们把俘虏关进了一间屋子里。

不论主动或被动分词名词或形容词，都可能有宾格，有时还可能有复数。

B. 表语

由系动词 *esti, resti, aspekti, iĝi* 等引入的说明主语的词、词组或从句，叫做表语。充当表语的有：

(1) 名词、代词、形容词、副词、数词，原形动词，例如：

1. Mi estas viro. 我是男子。

2. Ŝi estas brava. 她是英勇的。

3. Nia instruisto estas li. 我们的老师是他。

4. Ludi kun tigro estas danĝere. 和老虎玩是危险的。(主语是原形动词)

5. Entute ili estas dek. 他们总共10位。

6. Mia konsilo estas lerni. 我的劝告是学习。

7. Estas bone, ke vi venis. 你来了很好。(主语是从句。)

(2) 介词词组

1. Tiu ĉi seĝo estas por vi. 这把椅子是给你的。

2. La horloĝo estas el oro. 那表是金的。

(3) 名词从句

1. Lia demando estas, ĉu ŝi volas. 他的问题是她愿不愿意。

2. Mia respondo estas, ke ŝi ne volas. 我的回答是她不愿意。

C. 宾语表语

宾语表语也叫宾语补语，是用来补充说明宾语而又与谓语动词有关联的句子成分，用 *kiel* 或 *kvazaŭ* 引入的叫间接宾语补语，如果它们是名词时要用宾格，不用 *kiel, kvazaŭ* 而直接充当宾语表语的；如果是名词或形容词，就用主格。例如：

1. Ni elektis lin nia estro. 我们选他做我们的领导。

2. Ni elektis lin kiel nian estron. (同上句)

3. La malvenko faros lin nefiera. 失败使他不骄傲。

4. Ni vidis la infanon ludanta. 我们看见那孩子在玩耍。

5. Ni vidis ŝin danci. 我们看见她跳舞。

EKZERCOJ 练习

A. 将下列词译为汉语:

- | | | |
|-----------------|------------------|----------------|
| 1. naĝilo | 2. ŝercanto | 3. kuŝanto |
| 4. kuŝiĝi | 5. turistino | 6. akompananto |
| 7. pekinano | 8. originalulo | 9. ekbruli |
| 10. mokema | 11. registaro | 12. tuŝebla |
| 13. antaŭenpuŝi | 14. kaptito | 15. ekpuŝi |
| 16. kaptebla | 17. kreaĵo | 18. rimarkebla |
| 19. ŝanĝiĝi | 20. ŝanĝiĝema | 21. vekhorloĝo |
| 22. eltiri | 23. naĝejo | 24. kuŝejo |
| 25. brulanta | 26. reganto | 27. kaptilo |
| 28. birdkaptilo | 29. birdkaptisto | 30. kreinto |
| 31. puŝanto | 32. vekiĝi | 33. vekanto |
| 34. ektuŝi | 35. ŝanĝebla | 36. ŝiptiristo |
| 37. estrino | 38. vilaĝeto | 39. vilaĝano |
| 40. mokemulo | | |

B. 回答下列问题:

1. Per kio homoj naĝas?
2. Kiuĵ naĝas lerte kaj rapide?
3. Kion oni devas fari longe naĝinte en maro?
4. Kio estas plaĝo?
5. Kio estas konko? Por kio ĝi taŭgas?
6. Kio estas esperantisto?
7. Kio estas turisto?
8. Kio estas turisma gvidisto?
9. Kiel fariĝi lerta gvidisto?
10. En kia loko vi vivas?

C. 将下列句子译为世界语。



1. 我也爱游泳，但我从未在海里游泳。

2. 游泳有益健康。

3. 游泳以后我觉得很累。

4. 初学游泳需要人帮助。

5. 由向导陪伴旅行不必担心。

6. 纤夫生活很艰苦。

7. 有许多北京人没见过海。

8. 我同意，她也同意。

9. 同他认识你不高兴吗？

10. 我是来学习建筑艺术的。

C. 用下列词语各造一句：

1. kuŝante 2. kompreneble 3. moke 4. akompanante

5. kreinte 6. vekite 7. brulanta 8. ŝerce 9. plenuminte

10. regate

D. 改正下列句子中的错误：

1. La frato mokate li ekkoleris.

2. La ŝipoj tirata iras malrapide.

3. La turistoj laciĝinta ekripozis.

4. Ŝi rimarkinte la danĝeron, la amiko tuj alvenis laŭ ŝia peto.

5. Li fermis la kaptita tigron en dometon.

E. 将下面的故事译为汉语：

Longhara Knabino

Antaŭ multego da jaroj, en montvilaĝo vivis knabino havanta longajn harojn. Oni nomis ŝin Longhara Knabino. Ŝi kaj ŝia maljuna patrino vivis en pajla dometo. La patrino malsaniĝis, kaj ŝi devis laboregi por vivteni la familion.

Ĉirkaŭ la vilaĝeto estis altaj montoj, sur kiuj kreskis arboj malmultaj. Eĉ la arboj vivis malfacile pro manko de akvo. Por la popolanoj de la vilaĝo akvo valoris kiel oro.

Iutage, Longhara Knabino grimpis sur monton por kolekti fruktojn

kaj manĝeblajn kreskaĵojn. Ŝi vidis rafanon kaj ĝin ektiris, sed ĝi ne eliris. Ŝi tiris ĝin tutforte, kaj ĝi iris el la loko, kie tuj elkuris klara pura akvo. Ho, ĝi estis fonto! Longhara Knabino tre ĝojiĝis. Sed aŭdiĝis laŭta krio en la aero: “Kiu eltiris mian rafanon kaj ellasis mian fonton?! Neniun sciigu pri la vidita fonto. Se ne, vi perdus vian vivon!” Je tiuj vortoj, la rafano reiris en sian antaŭan lokon kaj la fonto malaperis.

La knabino estis mirigita. Ŝi volis sciigi la samvilaĝanojn pri ĉio vidita kaj aŭdita, sed ŝi timis, ĉar tion farinte ŝi devus morti.

Multaj en la vilaĝo malsaniĝis pro manko de akvo. Longhara Knabino tre maltrankviliĝis. Por helpi la samlokanojn, fine ŝi diris la mirindan okazaĵon al ili. Ili tuj grimpis sur la monton. La rafano estis eltirita kaj distranĉita, kaj la fonto donis al ili tiom da dolĉa akvo kiom ili bezonis.

La malbona spirito tre koleriĝis. Ĝi diris al Longhara Knabino, ke ŝi devas kuŝi en malvarma akvo de la fonto kaj morti en longa sufero. La knabino tute ne timis tion, ĉar ŝi sentis sin feliĉa pro helpo al la samlokanoj.

La dio de la monto venis por helpi Longharan Knabinon. Ŝi ricevis konsilon de la dio kaj faris laŭ ĝi. Ŝi venkis la montan spiriton kaj ne perdis sian vivon. Havante fontakvon por kreskigi fruktarbojn kaj florojn, ŝi kaj ŝiaj samlokanoj vivis tre feliĉe.



DUDEKUNUA LECIONO 第二十一课

BAZAJ FRAZTIPOJ 基本句型

1. Pardonon, ke mi malfruas.
2. Li estas forvokita por ripari diktafonojn bezonatajn en lernado.
3. Origine ĝi estis nomata Palaco de Ĉasado.
4. Sekve de la disvolviĝo de la turisma afero, la Granita Domo estos pli konata de homoj.
5. Ĉu vi scias, el kia ŝtono ĝi estas konstruita?
6. La parko vizitata de ni nomiĝas Parko Fiŝmonteto.

NOVAJ VORTOJ 生 词

kolego 同仁

ripari [*tr.*] 修理

kelkaj 几个

bedaŭri [*tr.*] 悲悼, 惋惜, 遗憾

bedaŭrinde 遗憾, 可惜

konstrui [*tr.*] 建造

ordinara 平常的, 普通的

granito 花岗石

origino 来源, 根源

palaco 宫殿

ĉasi [*tr.*] 狩猎, 猎取

volvi [*tr.*] 绕, 缠, 卷

dis-volv-iĝi 展开, 发展

parko 公园

fiŝo 鱼

pavimi [*tr.*] 铺路面

fresko = murpentraĵo 壁画

sata 饱的

ŝteli [*tr.*] 偷窃

miaŭi [*ntr.*] 喵喵叫

kato 猫

gliti [*ntr.*] 滑动

ruli [*tr.*] 滚动(别的)

ruliĝi 滚(自身)

kompari [*tr.*] 比较

spiti [*tr.*] 不顾

vilaĝo 村庄

TEKSTO 课文

Arkitekturo de la Urbo (1) 城市建筑 (一)

Wen Qing: Saluton, instruistino!

Li Cheng: Saluton, Wen Qing!

Jiang Hai kaj Xiao Mei: Saluton, Wen Qing!

Wen Qing: Saluton! Pardonon, ke mi malfruas.

Li Cheng: Ne gravas.

Jiang Hai: He, Wen Qing! Kial Yang Fan ne venis?

Wen Qing: Ho, li ne povas veni.

Xiao Mei: Kial?

Wen Qing: Lia kolego nomata Zhang Hua forvokis lin.

Li Cheng: Por kio?

Wen Qing: Li estas forvokita por ripari kelkajn diktafonojn bezonatajn en lernado.

Jiang Hai: Ha! Por vi estas bedaŭrinde!

Wen Qing: Iru for, petolulo!

Xiao Mei: Instruistino, ni iru rigardi la arkitekturon de la urbo.

Li Cheng: Bone. Jiang Hai, hodiaŭ vi ne estas gvidisto, ĉu?

Jiang Hai: Jes, hodiaŭ mi estas gvidisto.

Wen Qing: Kial vi ankoraŭ ne tuj iru?

Jiang Hai: Jes, mi tuj iru. Bonvolu!

Li Cheng: Jiang Hai, la arkitekturo de via urbo estas tre originala.

Jiang Hai: Jes. La konstruaĵoj konstruataj kaj konstruitaj

beligas nian urbon.

Wen Qing: Mi pensas, ke ankaŭ la konstruotaj konstruaĵoj plibeligos nian urbon.

Xiao Mei: Rigardu, tie estas alia neordinara konstruaĵo!

Li Cheng: Jes. Ni iru tien rigardi.

Li Cheng: Jiang Hai, kio estas tiu konstruaĵo?

Jiang Hai: Ĝi estas nomata Granita Domo.

Li Cheng: Granita Domo?

Jiang Hai: Jes, Granita Domo.

Xiao Mei: Kiam ĝi estis konstruita?

Jiang Hai: Ĝi estis konstruita en mil naŭcent tri kaj havas germanan stilon. Origine ĝi estis nomata Palaco de Ĉasado.

Li Cheng: Estas vere neordinara konstruaĵo!

Jiang Hai: Sekve de la disvolviĝo de la turisma afero, la Granita Domo estos pli konata de homoj.

Wen Qing: Instruistino, la Granita Domo estas konstruita tute el ŝtonoj.

Jiang Hai: Ĉu vi scias, el kia ŝtono ĝi estas konstruita?

Wen Qing: Ne, mi ne scias.

Jiang Hai (al Xiao Mei): Ĉu vi scias?

Xiao Mei: Ankaŭ mi ne.

Li Cheng: Jiang Hai, do certe vi scias!

Jiang Hai: Kompreneble jes. Ĝi estas mondfama granito de la monto Laoshan.

Wen Qing: Ho, mi ekmemoras!

Jiang Hai: Kion vi ekmemoras?

Wen Qing: Multaj konstruaĵoj de nia urbo estas konstruitaj el la granito de Laoshan.

Xiao Mei: Instruistino, vi kune fotiĝu, ĉu bone?

Li Cheng: Bona ideo. Ni bone staru!

Jiang Hai: Instruistino, la parko vizitata de ni nomiĝas Parko Fiŝmonteto.

Xiao Mei: Jes. Tiu ĉi vojo estas pavimita de homoj.

Wen Qing: Ankaŭ tiuj rokaĵoj estas arte faritaj.

Li Cheng: La fiŝoj skulptitaj sur la fresko estas vivsimilaj.

ETA RAT'

C = 1 2 / 4 Elĉinigis Laŭlum

(5 5 3 | 5 6 5 | i i i | i 6 5 | 5 3 2 1 2 3 | 1 5 1) D

5 5 3 | 5 5 3 | 5 5 3 | 5 6 5 |
E- ta rat' en mal- sat' grimpas por ŝtel' de lakt'!

i i i | i 6 i 5 | 5 5 5 3 2 1 2 3 |
Miaŭ miaŭ miaŭ ve- nas kat'. Glitruliĝo glitruliĝo,

1 — (| i i i | i 6 i 5 | 5 5 5 3 2 1 2 3 | 1 5 1 | 1 —) ||
fal'!

KLARIGOJ 注 释

1. Pardonon, ke mi malfruas. (请原谅, 我迟到了。) 这是 Mi petas vian pardonon pro tio, ke mi malfruas. 的省略。前面讲状语从句时我们已经提到, pro tio, ke 可以将 pro tio 省略。ke 引入的本是名词从句, 做 tio 的同位语使用。如果省去 pro tio, ke 引入的从句就直接做状语从句用了。因为是表示原因的, 称做原因状语从句。

2. forvoki lin = voki lin fora (fora 是宾语表语, 由于 voki, 结果他变成了“fora”)。

3. Por vi estas bedaŭrinde (ke li estas forvokita). 括号中的部分省去了。

4. plibeligi = igi pli bela 与 pli beligi 的意思不完全相同。

5. neordinara 不寻常的, 与 ekster-ordinara 意思相仿, 后者是“异乎寻常的”。

6. sekve de la disvolviĝo... 随着...的发展

7. fotiĝi (被)照相

8. arte farita (用技艺做的)人工的

GRAMATIKO 语 法

A. 主语

第三课已经讲过, 主语是一句话的主题, 是句子谈论的人或事物。除了无主句以外, 谓语动词都是用来说明主语怎样的。动词如果是主动语态, 主语就是动作的执行者; 如果动词是被动语态, 主语就是动作的承受者; 如果动词是由及物动词加 *-iĝ-* 变成的中间语态, 主语就既是动作的“执行者”又是动作的承受者。对于后者虽然我们学过了用例, 还需进一步说明。请看下面的一组例句:

1. Ŝi vekis lin. (她唤醒了他。)她是动作的执行者。vekis 是主动语态动词。

2. Li estas vekita de ŝi. (他现在被她唤醒了。)主语 li 是动作的承受者, 而“唤醒者”则充当了介词 *de* 的补语。estas vekita 这是被动语态。

3. Li vekigis. (他醒了。)他既是唤醒者, 又是被唤醒者。用这样的句子不去说 veki 的动作是谁作的, 也不说承受谁的 veki 的动作。人们在生活中有时需要这种模糊的说法。汉语的“醒”字就是表现这种 vekigi 的意味, 如果要用 veki 就必须说动作的执行者和承受者了。我们说“这本书容易读”也是不说谁“读”。本来书是“读”的承受者, 话又不那么讲。当然书是不会“读”的, 可是用做了主语。世界语的 *La libro legiĝas facile.* 正是表达这种意思。legiĝas 是“中间语态”。

此外还有主语使别人干什么的说法, 例如:

Li konstruigis domon per arkitekto kaj laboristoj. (他叫建筑师和工人造房子) 主语 li 只是使役别人, 自己不干活。konstruigi 由及物动词加 -ig- 构成, 称为使役语态。

上面说的是主语的几种作用。可以用做主语的是什么呢? 下面分别举例谈谈:

(1) 名词(要用主格)

1. Parko estas loko por ripozi. 公园是休息的地方。
2. Fiŝo vivas en akvo. 鱼在水中生活。
3. Homo rulis ŝtonegon. 人滚动大石头。
4. La ŝtonego estis rulata de homo. 那块大石头被人滚动。
5. La ŝtonego ruliĝas. 那块大石头在滚动。

(2) 代词(用主格)

1. Li riparis horloĝojn. 他修了表。
2. Ŝi estas amata. 她被爱。
3. Ĝi vidiĝas. 它给看见了。
4. Neniu komprenis tion. 谁也不明白那个。
5. Ĉio bone iras. 一切顺利。

(3) 数词

1. La unua devas iri tuj. 第一个现在要马上走。
2. Ses estas duoblo de tri. 6是3的2倍。

(4) 原形动词

1. Naĝi estas bona sporto. 游泳是一项好的体育运动。
2. Ŝteli ne povas riĉigi. 偷窃不能致富。
3. Labori estas necese por bone vivi. 劳动对于好好生活是必要的。

(5) 做名词使用的形容词等

1. La malriĉaj ne timas la riĉajn. 光脚的不怕穿鞋的。
2. La “tuj” de la sinjoroj estas multe da horoj. 老爷们的“立刻”是一拖再拖。(tuj 本是副词, 在这里当名词用, 说“tuj”等于许多小时。这是句谚语 sinjoroj 和 horoj 押韵, 译文为押韵作了变通。也可译为“老爷的‘立即’是好几小时。”)

3. Iom da mono estas bezonata. 一点钱是需要的。(iom da 和 su-

meto da 形式不同，意思相似，一个用副词形式，一个用名词形式。 multe da 和 multo da 一样）。

(6) 短语

1. Antaŭ tagiĝo estas pli bona tempo ol post tagiĝo. 在黎明前是比黎明后更好的时间。

2. En la domo estas pli bona loko ol ekster ĝi. 室内有比室外更好的地方。

(7) 名词从句

1. Ĉu ĝi estas granita estas demando. 它是否花岗石的，是个问题。

2. Ke la birdo povas paroli certe mirigos la vizitantojn. 这鸟会说话，一定会使参观者惊奇。

3. Ke vi konstruu lernejojn estas mia konsilo. 你们要修建学校，这是我的建议。

4. Kiuj riparis la vojon estas afero nesciata. 谁修的路，这事不知道。

5. Ke la palaco malfermiĝis al la urbanoj estas novaĵo por mi. 宫殿对市民开放了，这对我是个新闻。

6. Kial li ne venis estas mirindaĵo por mi. 为什么他没来，对我是件奇怪的事。

7. Kiel li trapasos la danĝerejon nun ege maltrankviligas nin. 他将如何通过险境，使我们极为不安。

8. Kies forto estas pli granda montriĝos en la konkurso. 谁的力气更大，将会在运动会上显示出来。

9. Ke li lernas maldiligente estas la kaŭzo de lia malrapida progreso. 他学习不用功，是他进步慢的原因。

10. Ŝajnas al mi, ke ĝi estas ordinara fiŝo. 我觉得它好象是条普通的鱼。

11. Ne plaĉas al ŝi, ke vi ŝin ne salutis. 你没招呼她，使她不快。

12. Ne malhelpas nin, ke li ne venis. 他不来不碍我们的事。

13. Estas bone, ke vi venis. 你来了很好。

14. Estas bedaŭrinde, ke la kato malaperis. 可惜那只猫不见了。

15. Estas grave, ke vi helpu. 要紧的是你要帮忙。

16. Estas dezirinde, ke ni kunvenu en la parko. 希望我们在公园开会。

17. Estas certe, ke li helpus ŝin, se ŝi petus lin. 如果她求他, 他会帮助她, 没问题。

18. Estus bone, se li venus, sed li ne venis. 他要来就好了, 可是他没来。

应该提醒的是, 13—18例句的主句中都用副词做表语, 而且这样的句型用得很广。例句14的 *Estas bedaŭrinde, ke...* 还经常省去系动词 *estas*, 变成 *Bedaŭrinde, ke...* 这两点应牢记。

B. 短语介词

由短语(也叫词组)构成的介词, 叫短语介词或词组介词。常用的短语介词是由副词加介词 *al, de, kun* 构成的。举例说明如下:

(1) 带 *al* 的短语介词

(a) *dank' al* (*danke al* 之略) 靠、借

1. *Ŝi sukcesis dank' al via helpo.* 靠你的帮助她成功了。

2. *Dank' al diligenteco li progresas sufiĉe rapide.* 他依靠勤奋进步相当快。

3. *Dank' al la mirinda vortfarado, Esperanto ne bezonas grandan vortaron.* 依靠巧妙的构词法, 世界语不需要庞大的词汇。

(b) *proksime al* 靠近

1. *Li loĝas proksime al la maro.* 他住的靠近大海。

2. *Ili laciĝis proksime al morto.* 他累得快死了。

(c) *renkonte al* 迎着

1. *Ili iras renkonte al la matena suno.* 他们迎着朝阳走去。

2. *Ŝi kuris renkonte al la vento.* 她迎着风跑。

3. *Li brave komencis labori renkonte al la malfaciloj.* 他迎着困难勇敢地开始干起来。

(ĉ) *spite al* 不顾

1. *Spite al la malpermeso li provis mem ripari la fotilon kaj sukcesis.* 他不顾不许可, 自己试修相机, 而且成功了。

2. *Ŝi foriris, spite al malkonsilo.* 她不顾劝阻走了。

(2) 带 de 的短语介词

(a) fare de 由…，被谁（因为 de 有多种意义，加 fare 来确指动作的执行者有时很必要。现在有采用介词 far 来表示 fare de 的趋势。）

1. La ĉaso fare de tigro estas rigardinda. 老虎捕猎是值得观看的。
（如果说 La ĉaso de tigro estas rigardinda 可能被理解为“捕猎老虎是值得观看的。”为了避免误解，这后一句宜改为 La ĉaso al tigro estas rigardinda.）

2. La helpado fare de li sukcesigis ŝin. 他给的帮助使她成功了。
（=La helpo far li sukcesigis ŝin.）

(b) okaze de 当…之际（=je la okazo de）

1. Okaze de la centjariĝo de Esperanto, ni aranĝis grandan feston.
在世界语百周年之际，我们组织了盛大的庆祝。

2. Okaze de la ekskurso ili faris multajn fotojn. 在郊游的时候，他们拍了许多照片。

(c) sekve de 随着…，由于…

1. Sekve de la unua sukceso, li pli interesigis pri naĝado. 由于第一次的成功，他对游泳更有兴趣了。

2. Sekve de la ekzercado, ŝi plilertiĝis. 随着练习她更灵巧了。

(ĉ) flanke de 在…旁边

1. Flanke de la vojo kreskas pomarboj. 道边长着苹果树。

2. Ili ĉiam staras flanke de mi. 他们总是站在我这边。

(d) supre de 在…顶上

1. La ekskursantoj kantis kaj dancis supre de la monto. 游玩的人们在山顶上唱歌跳舞。

2. Supre de ili regas kolerema estro. 在他们头上有个爱发脾气的头头管着。（这里可用 super 代替 supre de.）

由表示方位的副词与 de 结合成的短语介词，如 dekstre de, ekstere de 等，可以照这个模式构成。

(3) 带 kun 的短语介词

(a) kune kun 一同，共同，一起

1. Li riparigis la ŝipon kune kun la kolego. 他和同事一起修了那条船。

2. Mi ĉasos kune kun la lertulo. 我将同能手一起打猎。

(b) kompare kun 比

1. Kompare kun la palaco lia domo estas malpli bela. 与那座宫殿相比，他的房子不那么漂亮。

2. Ŝi estas pli saĝa kompare kun (=ol) sia patrino. 她比她妈妈更聪明。

分析上面的例子可以看出，那些置于介词前的副词，大都可以分解为 en ~o, 就是说 kompare kun = en komparo kun, kune kun = en kuneco kun, flanke de = en flanko de。

EKZERCOJ 练习

A. 将下列词译为汉语：

- | | | |
|----------------|-----------------|-----------------|
| 1. gekolegoj | 2. riparisto | 3. bedaŭro |
| 4. konstruejo | 5. konstruisto | 6. ordinarulo |
| 7. granitaĵo | 8. Germanujo | 9. palaceto |
| 10. ĉasaĵo | 11. ĉasisto | 12. ĉasejo |
| 13. fiŝejo | 14. fiŝisto | 15. malsata |
| 16. satiĝi | 17. malsatiĝi | 18. malsatmorti |
| 19. ŝtelisto | 20. ŝtelaĵo | 21. laktujo |
| 22. katino | 23. katido | 24. kateto |
| 25. glitejo | 26. glitkuri | 27. rulilo |
| 28. satulo | 29. riparebla | 30. riparinda |
| 31. rekonstrui | 32. malkonstrui | 33. malvolvi |
| 34. glitigi | 35. ŝtelema | 36. ĉasemulo |
| 37. satigi | 38. fiŝejo | 39. riparilo |
| 40. fiŝkapti | | |

B. 将下列句子译为世界语：

1. 请原谅，我把书丢了。
2. 这座公园叫和平公园。
3. 你知道这些高楼是谁修建的吗？

4. 当然知道，它们是工人修建的。

5. 可惜下雨了。

6. 她的衣服是独特的。

7. 我们用花木美化自己的城市。

8. 这个船舶修理所是1987年建的。

9. 我们室内的花不是人造的。

10. 这个石羊是谁雕塑的？

C. 用下列词语各造一句，

1. dank' al 2. fare de 3. spite al 4. kune kun 5. okaze de

6. sekve de 7. proksime al 8. kompare kun 9. flanke de 10. supre de

Ĉ. 改正下列句中的错误。

1. La horloĝo perdis.

2. Mi mankas monon.

3. Estas bedaŭrinda, ke li malsukcesis.

4. Ŝi faris ŝian taskon.

5. Li riparinte mian fotilon, mi pagis lin, por lia servo.

6. Se mi povas flugi kiel birdo, mi tuj venos al vi.

7. Ĉiu birdo havas duflugiloj.

8. Mi aĉetis multe da florojn.

9. Ni iris ĉirkaŭ 1000 metroj.

10. Ili flugis tra la nubojn.

D. 将下面的短文译为汉语：

Fiŝista Vilaĝo

Nia instruisto naskiĝis en fiŝista vilaĝo. Por konigi al ni sian hejmvilaĝon kaj la vivon de fiŝistoj, li gvidis nin fari ekskurson al lia hejmloko.

La vilaĝo estas malgranda. En ĝi loĝas nur iom pli ol ducent homoj. "Antaŭ la Liberigo," diris nia instruisto, "malpli da loĝantoj ĝi havis." La domoj de la vilaĝanoj staras ĉe montpiedo. Ili laboras ĉefe en fiŝkaptado. Krom fiŝkaptado iuj el la loĝantoj kreskigas markreskaĵojn aŭ

fruktarbojn. Iuj ankaŭ laboras surkampe.

Alveninte al la marbordo ni vidis neniun ŝipon ĉe ĝi. "Ili ĉiuj forveturis," diris la instruisto, "por kapti fiŝojn surmare."

Ni vizitis la hejmon de nia instruisto. Lia patrino, havanta la aĝon de 75 jaroj kaj blankan hararon, diris al ni, ke la fiŝista vivo estas nefacila, ĉar ili devas labori surmare ankaŭ en malbona vetero. Se ventegas, la maro koleriĝas kaj fariĝas malamika al la fiŝistoj. Ŝi rakontis al ni, ke foje iu fiŝisto kaptis fiŝegon. Sed ĝi estis tro granda por lia ŝipeto. Ĝi kuregis tirante lin kaj la ŝipeton kaj preskaŭ faligis lin en la maron. Feliĉe samlokanoj helpis lin kaj li ne perdis la vivon. Sed la fiŝego forkuris. Nun la fiŝistoj havas pli grandajn ŝipojn kaj ili laboras kvar- aŭ kvin-ope. Nun oni konstruas laborejon por prilabori fiŝojn. Kiam la nova konstruaĵo estos finkonstruita post kvar monatoj, tiam la vilaĝo povos mem prilabori la fiŝojn kaj ricevi pli multe da mono.

Post la reveno de la fiŝistoj en la vespero, ni ĝoje interparolis kun ili, kaj ricevis pli multe da scioj pri ilia vivo.

Nun mi jam pli bone scias fiŝistan vivon. La fiŝistoj estas bravuloj. Ĉiuj, kiuj manĝas fiŝojn, devas ilin kore danki.



DUDEKDUJA LECIONO 第二十二课

BAZAJ FRAZTIPOJ 基本句型

1. Helpate de la Marrigarda Altano, vi povas vere ĝui la belecon de la urbo.
2. Ekskursinte mi ricevis profundan impreson ankaŭ pri la arkitekturo de la urbo.
3. Tie ĉi troviĝas multaj turistoj el aliaj landoj.
4. Mi vizitos vian urbon de tempo al tempo.
5. Plaĉas al mi, ke vi helpu lin.
6. Estas bone, ke vi iru.
7. Ŝajnas al mi, ke li malsaniĝis.
8. Bedaŭrinde, ke ili ne venis.

NOVAJ VORTOJ 生 词

laŭdi [tr.] 夸赞, 赞扬

patrioto 爱国者

poeto 诗人

altano 平台, 眺望台

katoliko 天主教徒

preĝi 祈祷

preĝ-ej-o 礼拜堂, 教堂

ĝeto 突堤

urbo-domo 市政厅

Kristo 基督

krist-an-o 基督徒

krist-an-ism-o 基督教

-ism- [后缀] 表主义, 教

ĝui [tr.] 享受, 享用

hotelo 旅馆

natur-o 自然

profunda 深的

impresi [tr.] 给予印象

trovi [tr.] 发现, 找到

anglo 英国人

franco 法国人

japano 日本人

jugoslavo 南斯拉夫人

Usono 美国

uson-an-o 美国人

-i- 〔后缀〕 表示国家

Franc-i-o 法国

formo 外形, 形式, 样子

formi [tr.] 形成

kontroli [tr.] 检查

ofte 时常

flui [ntr.] 流

flue 流畅, 流利

lando 国家, 国土

noti [tr.] 记, 笔记, 摘记

TEKSTO 课文

Arkitekturo de la Urbo (2) 城市建筑(二)

Jiang Hai: Instruistino, tiu ĉi fresko estas kreita de mia konato.

Xiao Mei: Kiu estas tiu pentrito sur la fresko?

Wen Qing: Li estas Qu Yuan, laŭdata patriota poeto.

Li Cheng: He, Jiang Hai! Kion vi faras?

Jiang Hai: Mi atendas vin, fototojn.

Li Cheng: Jiang Hai, turnu vin dekstren. Kio estas tiu blanka konstruaĵo?

Jiang Hai: Ĝi estas nomata Marrigarda Altano por rigardi la pejzaĝon de la maro.

Xiao Mei: Instruistino, ni supreniru.

Li Cheng: Bone.

Jiang Hai: Rigardu, instruistino. Tio ĉi estas Katolika Preĝejo kaj tio estas Ĝeto Zhanqiao.

Wen Qing: Tio ĉi estas la Urbodomo kaj tio estas Kristanisma Preĝejo.

Xiao Mei: Tio ĉi estas Parko Fiŝmonteto kaj tio estas Hotelo Yingbinguan.

Li Cheng: Ho, ĉi tie oni povas kaj rigardi la pejzaĝon de la maro kaj ĝui la arkitekturon de la urbo.

Jiang Hai: Helpate de la Marrigarda Altano, vi povas vere ĝui la belecon de la urbo.

Li Cheng: Jes, vizitote, la naturaj belaĵoj de la marborda urbo lasis al mi belan memoron.

Xiao Mei: Kaj ekskursinte?

Li Cheng: Ekskursinte, ankaŭ pri la neordinara arkitekturo de la urbo mi havas profundan impreson.

Jiang Hai: La blua maro kaj lazura ĉielo, la ruĝaj tegmentoj kaj verdaj arboj formas nian belan urbon.

Wen Qing: Tie ĉi troviĝas ankaŭ multaj turistoj el aliaj landoj.

Jiang Hai: Inter ili troviĝas angloj, francoj, germanoj, japanoj, jugoslavoĵ kaj usonanoj.

Wen Qing: La pliparto estas el Japanio.

Xiao Mei: Ĉiuj turistoj ŝatas nian urbon.

Li Cheng: Jes, ankaŭ mi ekŝatis vian urbon ekskursinte.

Jiang Hai: Instruistino, via ofta vizito al nia urbo ĉiam estos bonvena.

Li Cheng: Mi certe vizitos vian urbon de tempo al tempo.

Wen Qing: Instruistino, iom ridetu! (Fotas.) Bonege!

KLARIGOJ 注 释

1. krei (创造) 用来说艺术作品时, 与 verki 的意思相同, 可译为创作。

2. konato 熟人
3. Marrigarda Altano 观海台
4. Katolika Preĝejo 天主教堂
5. Kristanisma Preĝejo 基督教堂, 可以将 -ism- 省去。
6. ĝui la belecon de la urbo 领略城市的美
7. profunda impresoj 深刻印象
8. la blua maro kaj lazura ĉielo 在 lazura ĉielo 前省去了 la, 因为前面已经有了, 可以不必重复。
9. pliparto 大部分, 还有 plejparto (绝大部分) 的说法。
10. via ofta vizito al nia urbo ĉiam estos bonvena 欢迎你随时常来
11. de tempo al tempo 不时地

GRAMATIKO 语 法

A. 后缀 -ism-, -i-

(1) 后缀 -ism- 表示主义、教义、学说、惯用式等

Marks 马克思	marksismo 马克思主义
Lenin 列宁	leninismo 列宁主义
Darvin 达尔文	darwinismo 达尔文学说
katoliko 天主教徒	katolikismo 天主教
kristano 基督徒	kristanismo 基督教
Konfucio 孔夫子	konfucianismo 儒教
anglo 英国人	anglismo 英国说法

(2) 后缀 -i- 加在民族名上表示国家

anglo 英国人	Anglio 英国
franco 法国人	Francio 法国
germano 德国人	Germanio 德国
japano 日本人	Japanio 日本
jugoslavo 南斯拉夫人	Jugoslavio 南斯拉夫
ĉino 中国人	Ĉinio 中国

后缀 -uj- 也可以表示国家, 因为它既表示容器又表示树木和国家, 人们

日渐倾向少用它表示树木和国家。

B. 关于世界语的诗词格律

在第5、7、16、17、18、19和21课介绍了几支儿歌，下面简单介绍一下世界语的诗词格律。先介绍几个基本术语：

(1) 韵律

诗句是由有规律地更迭变化的轻音节和重音节构成的，诗歌的这种有规律的节奏就是诗的韵律。世界语的多音节词的重音都在倒数第二音节。要使诗句有节奏就要有意识地调整句子的用词、句子结构、语序，运用可能的手段缩短或拉长句子的某个部分。例如：Du tigroj kuras rapide. (两只老虎跑得快) 这句话的节奏是怎样的呢？如果用“=”代表重音音节，用“o”代表非重音音节，它的图解就是：

o = o = o o = o

因为du的意思比较重要，这个单音节的词在句中也要重读，它可以取得逻辑重音，所以这句话实际要读做：

= = o = o o = o

显然，轻重音节的更迭没有规律，这个句子的安排就不符合世界语一般韵律的要求。如果略微改变一下说法，就可以使它成为韵律整齐的句子，例如：

Tigra paro kuras en rapido.

= o = o = o = o = o

介词 en 是单音节词，没有语法重音，但可以根据逻辑意义的重要性取得逻辑重音，即使不算重音音节，至少可以做为次重音音节，可以用“—”来表示，图解为：

= o = o = o — o = o

这样一来，句子的意思仍旧没变，而节奏却整齐了。这种韵律和两拍子的歌曲完全符合，一重一轻。

比较讲究的文学散文也讲究韵律节奏，不过比韵文要自由，富于变化。

(2) 诗句

或者叫诗行，就是一行诗。诗行不一定是完整的句子。例如下面的两行诗是一句话：

Verda stelo, verda stelo,

vi simbolo de espero!

因为它们各有8个音节，节奏相同，构成了两个有节奏的单位。如果我们在 vi 后面加上 estas，就破坏了有规律的节奏，读起来觉得节奏不一样，这就不符合音韵规律了。

(3) 音步

图解一下上面的两行诗，我们会对它们的构造取得进一步的认识：

Verda stelo, verda stelo,

= o = o = o = o

vi simbolo de espero!

= o = o = o = o

我们可以把诗行划分成为若干相同的单位“= o”。这种构成诗行的单位称做“音步”。这两行诗各有四个音步。

音步含有重音音节和非重音音节。由于它们的数目和搭配方式不同，可以产生各种不同的音步。世界语最常见的音步有以下几种：

1. 重轻格 (=o)

上面举的两行诗都是由重轻格音步构成的。

2. 轻重轻格 (o=o)

下面的诗句是由轻重轻格组成的：

Ho, kiel rapidas sinjoro

Ĉasisto post tima leporo!

它们的结构是：

o = o o = o o = o

o = o o = o o = o

每行各由3个轻重轻格音步组成。

(3) 轻重格 (o=)

因为世界语的词重音在倒数第二音节，前面讲的两音步是大量存在的，轻重格则几乎不存在。但人们在诗歌里可以省略单数主格名词词尾“o”，而原来的重音位置不变。这样 laboro 和 sinjoro 就变成了 labor' 和 sinjor'，就成了轻重格音步。如果把诗行安排一下，就能形成由轻重格音步组成的诗行，例如：

Vi, bela flor' en neĝkolor',

o = o = o — o =

simbol' de pur' de mia kor'!

o = o = o = o =

两行诗各由四个轻重格音步组成。

4. 重轻轻格 (= o o)

这种音步在世界语词汇里也找不到。不过在诗句里音节前后可以搭配，只要行末有两个轻音音节连用就行了，例如：

Kuras rapide jen homoj du,

= o o = o o = o o

Ĉiam antaŭen kuregas plu.

= o o = o o = o o

每行各由3个重轻轻格音步组成。

5. 轻轻重格 (o o =)

在世界语里也不存在自然的轻轻重格的词，如果把4个音节的名词词尾“o”省去，可以构成 o o = 音步，只是太难了。可是靠诗句里长短词的搭配，仍可形成轻轻重格音步系列，例如：

Malamikoj ĉirkaŭis la urbon de pac',

o o = o o = o o = o o =

dum l' urbanoj profunde dormadis pro lac'.

o o = o o = o o = o o =

每行各由4个轻轻重格音步组成。

世界语有大量3个音节的词和两个音节的词，所以 = o 格和 o = o 格的诗句比较容易组成。

(4) 押韵

诗句不但要有规律整齐的节奏，而且诗行末尾的词要互相谐韵，也就是说两个或几个词从重音音节的元音起完全一样，或基本相似。例如：pac' 和 lac' 的 ac 是一样的，它们就押韵。sinjoro 和 leporo 也押韵，因为从重音音节的元音 o 起，两个词都有 oro。kor' 和 neĝkolor' 是押 or' 的韵，它们虽省去了“o”，重音位置不变。homoj du 和 kuregas plu 不能算押韵，因为它们是非重音音节，不然就算不得重轻轻格 (= o o) 了！

如果押韵的部分完全一样，那是最理想的了，叫“纯韵”。如果元音相同，辅音相似（如 d 和 t，b 和 p, g 和 k，l 和 r，m 和 n，s 和 z，f 和 v, ĝ 和 ĉ，ŝ 和 ĵ 等）也还可以。虽然用后缀形成韵很容易（例如 legi 和 skribi 本不押韵，如果写成 legadi 和 skribadi 就押韵了），但读来觉得重复乏味，应避免使用。

（5）顿

由三个以上的音步构成的诗行，大都有两个比较重要的重音节，一个在行末，一个在中部。其他位置该有重音的地方可以马虎一点，有时用次重音节（如单音节的介词、代词），或者甚至用非重音音节。允许这样自由安排不仅可以减小难度，而且可以打破韵律的单调。行末的重音音节往往是押韵的，也就是韵脚。中部的重音则形成诗行的“顿”。所谓顿不是停顿的意思，不过因为有主要的重音音节，会给听者以较强的印象，当然也有时候会碰上停顿。顿和韵脚起着维护诗行的节奏的作用，它们就象标兵一样，站在重要的位置上，使行进的行列即使有个别人不守规矩也不致乱套。诗句越长，顿的位置越固定。短的诗句不需要顿，因为有韵脚就够了。不带弱音节的顿叫阳顿，带非重音音节的顿叫阴顿。

如何运用诗词格律去进行诗歌创作和翻译是比较复杂的问题。这里仅就几首歌词里的问题做一点说明。

歌曲的轻重拍子和诗的轻重音节相似。翻译歌词的时候，必须注意把重音音节放在强拍子上，把非重音音节放在弱拍子上，这样唱起来才和谐一致。若把非重音音节错放在强拍子上（如四分之二拍的歌曲的第一拍，四分之四拍的歌曲的第一和第三拍上），尤其是拖腔的音，听起来觉得很别扭。

歌词不仅讲究节奏，也着重押韵，有韵唱起来觉得更上口。翻译歌词时又要传达歌词的原意，又要押韵，又要与曲调的强弱拍子谐和一致，往往会顾此失彼。尤其汉语的歌词有音节少而含义丰富的特点，更加大了翻译的难度。要想使翻译的歌词唱来上口，就要有较大的灵活性才行。以“Tigra Paro”为例来谈谈翻译的问题：

歌词的原文本来是：

两只老虎，

两只老虎，

跑得快，

跑得快。

一只没有尾巴，

一只没有脑袋，

真奇怪，
如果照意思译成：
Du tigroj,
Du tigroj,
Kuras rapide,
Kuras rapide!

真奇怪。

Unu ne havas voston,
Unu ne havas kapon.
Vere mirinde,
Vere mirinde!

不仅节奏不规整，没押韵，而且和曲调的拍子不合。经过调整，得到了下面的译文：

Tigra paro,
Tigra paro,
En kurad',
En kurad'.

Unu sen vosto,
Unu sen kapo.
Mirindaĵ',
Por rigard'.

译文的节奏和原文相似，句有长有短，轻重音节的更迭比较自由。原文有五行押同一个韵，译文只做到了 kurad'、mirindaĵ'、rigard' 重音音节元音“a”的一致，还有 paro 与 kapo 元音的谐韵，唱起来还勉强可以。歌词的意思呢？为了谐韵，末一句加了 por rigard' 的意思，虽然可以说原文里暗含着“看样子”真奇怪的意思，究竟是变了样。当然还可以用别的方法来解决问题，不过总离不了“灵活”的原则。实际上这是在运用世界语的条件重新创作，因为照原文的样子用世界语写是不可能的。

EKZERCOJ 练习

A. 将下列词译为汉语：

- | | | |
|-------------------|-----------------|----------------|
| 1. laŭdinda | 2. mallaŭdi | 3. mallaŭdita |
| 4. laŭdegi | 5. laŭdema | 6. poetino |
| 7. preĝanto | 8. ĝuebla | 9. ĝuema |
| 10. ĝuinda | 11. ĝuemulo | 12. hotelego |
| 13. naturismo | 14. malprofunda | 15. profundejo |
| 16. malprofundejo | 17. impresebla | 18. trovita |

- | | | |
|----------------|----------------|-----------------|
| 19. troviĝi | 20. eltrovi | 21. anglino |
| 22. francismo | 23. japanino | 24. formiĝi |
| 25. senforma | 26. malofte | 27. maloftaĵo |
| 28. landego | 29. samlandano | 30. eksterlanda |
| 31. reformi | 32. enlanda | 33. landano |
| 34. hotelestro | 35. nenatura | 36. oftega |
| 37. oftigi | 38. ofteco | 39. malofteco |
| 40. retrovi | 41. trovebla | 42. patrolando |

B. 回答下列问题:

1. Kiel oni povas vidi vaste?
2. Kiu lando estas la plej riĉa en la mondo?
3. Kie vi loĝas? Ĉu en urbo aŭ vilaĝo?
4. Ĉu plaĉas al vi ekskurso sen tagmanĝo?
5. Kie estas Parko Fiŝmonteto? Ĉu tie estas fresko?
6. Kio estas fresko?
7. Kio estas kristano?
8. Kio estas poeto? Kia poeto estis Qu Yuan?
9. Kio estas hotelo?
10. Kion oni devas fari havante hotelon?

C. 将下列句子译成世界语:

1. 受到赞扬以后他有些骄傲起来。
2. 每一个爱国者都要好好工作, 为祖国创造财富。
3. 重要的不是形式, 而是内容。
4. 美国和日本都是富国, 可是它们仍有人受饥寒。
5. 怎样才能迅速使国家富强?
6. 没有祖国的人能幸福吗?
7. 要是你能找到工作那就好了。



8. 这座宾馆住着各国的旅游者。
9. 我来不是观赏风景的，是为了了解市民的意见。
10. 他们的勤劳给了我深刻的印象。

C. 完成下面的句子：

1. Estas tre bedaŭrinde, ke la ĉevalo...
2. Ne plaĉis al li, ke...
3. Ŝajnas al mi, ke tiu ĉi urbo...
4. Estas laŭdinde, ke vi bone...
5. Tion dirinte, ŝi...
6. Mi volas, ke vi...
7. Ĉu vi scias, kial...
8. Promenante en la parko, ŝi vidis...
9. Kaptite de la tigro, la leporo...
10. Timante malsukceson, li bone preparis sin antaŭ...
11. Spite al malpermeso, ili deprenis fruktojn ankoraŭ...
12. Helpate de sia amiko, li...

D. 用下列词缀各构一词：

- | | | | | | | |
|--------|----------|----------|-----------|----------|---------|--------|
| 1. -i- | 2. -uj- | 3. dis- | 4. -estr- | 5. -obl- | 6. -on- | 7. re- |
| 8. bo- | 9. -ind- | 10. fin- | 11. -um- | 12. -ul- | | |

E. 将下面的短文译为汉语。

Utiligu Ĉiun Minuton

Nia Esperanto-rondo akceptis novan membron, kiu transloĝiĝis al nia urbo en la lasta monato. Li estas mezlerneja instruisto pri muziko. Ĉar mi ankaŭ ŝatas muzikon, mi vizitis lin dimanĉe.

La muzikinstruisto estis puriganta sian ĉambron, kiam mi alvenis al lia loĝejo. Li afable akceptis min kaj petis mian pardonon pro tio, ke li devis daŭrigi la purigadon. Mi do helpis lin movi la skribotablon kaj se-

ĝojn por faciligi la laboron. Laborante ni komencis interparoli en Esperanto. Mi ekmiris, ke li parolis tre flue kaj senerare. Antaŭe li vivis en montaro, kie troviĝis neniuj esperantistoj krom li. Kiel do li lernis la lingvon kun tia sukceso?

“Vi parolas tiel flue kaj tute sen eraro!” mi laŭdis lin. “Kiel vi atingis tian sukceson? Kion vi konsilas fari en lernado de lingvo?”

Li ekrigardis min kun rideto. Finiĝis la purigado. Li petis min sidigi kaj trinki kafon. Kun saĝa brilo en la okuloj li komencis sian parolon:

“Mi laŭtleĝis ĉiumatene. Tio estas tre grava kaj necesa.” Li iom trinkis kaj daŭrigis: “Mi ne havis multe da libertempo pro la instruado: mi devis doni lecionojn, fari preparadon por tio, kontroli kaj senerarigi la hejmtaskojn plenumitajn de la lernantoj kaj viziti iliajn hejmojn por fari interkonsiliĝon kun iliaj gepatroj. Sed tamen mi havis libertempon, liberajn duonhorojn, kvaronhorojn, minutojn.”

Mi ekmiris je lia parolo pri liberaj minutoj. Mi eĉ neniam pensis pri ili. Kredeble la instruisto rimarkis miajn mirantajn okulojn, li klarigis:

“Jes, liberajn minutojn en aŭtobuso, sur vojo, en necesejo, antaŭ endormiĝo sur lito, dum promenado sen akompananto...”

“Ĉu vi laŭtleĝis ankaŭ en aŭtobuso?” mi intermetis.

“Ne, tion mi ne faris en aŭtobuso aŭ necesejo. Mi utiligis tie la libertempon por enmemorigi Esperantajn vortojn. Kiom da vortoj oni povas enmemorigi ĉiutage, se li povas enkapigi 5 vortojn ĉiutage?!”

Mi faris kalkulon. En ĉiu jaro estas 365 tagoj. 365-oble kvin faras 1825. “Ho, vere multe!” mi ekkriis kun miro.

“Tiel utiligante la liberajn minutojn mi sukcesis enmemorigi pli ol 3000 vortojn en du jaroj. Kaj ĉiumatene mi ellitiĝis frue por laŭtleĝi esperantaĵojn. Mi al kutimiĝis al tio kaj trovis ke ĝi estas tre utila al la lernado.”

Tiam li elpoŝigis malgrandan notlibron. Montrante ĝian enhavon al

mi, li klarigis: "Jen mia notlibro por vortoj. Mi notas la memorindajn vortojn en ĝi. Mi ĝin tralegadas en la liberaj minutoj. Se mi jam havas impreson pri iu vorto, mi markas ĝin per "/"; se tiaj vortoj fariĝis konataj, mi markas ilin per "∟"; se iuj vortoj fariĝis tre bone konataj kaj ĝuste uzablaj, mi markas ilin per "△". Kontrolado de la notlibro povas rimarikiĝi min pri la rapideco de mia progreso, kaj atentigi min pri mia maldiligenteco. La notlibreto multe min helpas en la lernado."

"Bonan lecionon vi donis al mi!" mi ĝoje diris kun dankemo. "Mi tre dankas vin pro via helpo!"

"Dankon al vi, ke vi helpis min en la purigado!" diris la instruisto kaj ekrigardis la ekzercajn librojn de lernantoj.

Mi komprenis, ke li devas kontroli la ekzercolibrojn de siaj lernantoj, do mi tuj diris "ĝis revido" kaj eliris el lia loĝejo. Survoje mi pensis, ke ankaŭ mi devas tiel utiligi la liberajn minutojn.



DUDEKTRIA LECIONO 第二十三课

BAZAJ FRAZTIPOJ 基本句型

1. Ni aranĝos tion, por ke ni kune pasigu la feston.
2. Mi venos akurate je la oka vespere.
3. Ĝis revido je la oka vespere!
4. Vi iradas kaj rigardadas, kvazaŭ vi estus ŝtelisto.
5. Antaŭ ol mi venis al via hejmo, mi jam vizitis lian hejmon.
6. Kiam mi atingis lian hejmon, li jam forestis.
7. Li faris tion dum la daŭro de tri semajnoj.
8. Baldaŭ batos la oka.

NOVAJ VORTOJ 生 词

sudo 南
nordo 北
oriento 东
okcidento 西
pavilono 阁
apreci [tr.] 欣赏
luno 月亮
ondo 浪
plaŭdi [ntr.] 发出拍水的泼刺声
preciza 精密的, 精确的
akurata 准时的

serĉi [tr.] 寻找, 寻求
parkere 暗记, 背
bati [tr.] 敲, 打
-aĉ- [后缀] 表示坏
aĉ-ul-o 坏人, 恶人
fi- [后缀] 表示轻蔑
fi-ul-o 流氓, 坏蛋
prezidi [tr.] 当主席, 主持(会议)
prezid-ant-o 主席

TEKSTO 课文

Renkontiĝo ĉe la Aŭtunmeza Festo (1)

中秋团圆 (一)

Yang Fan: Instruistino, ĉu vi estos libera vespere?

Li Cheng: Jes, mi estos libera vespere.

Wen Qing: Ĉu vi volas ĉeesti nian renkontiĝon?

Li Cheng: Kompreneble. Kia estos la renkontiĝo?

Yang Fan: Ni nomas ĝin renkontiĝo ĉe la Aŭtunmeza Festo.

Li Cheng: Ho, renkontiĝo ĉe la Aŭtunmeza Festo.

